



2(190)
2023

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo **ESPERANTO**

Bultenon redaktas:

ĉiuj anoj de Krakova Societo **ESPERANTO**,

Adreso por korespondi:

str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Aleksander Fredro

tradukis Lidia Ligęza

Czyżyk i zięba

Na ciemnym jarzębie
Młody czyżyk siadł przy ziębie,
A że zawsze myśl w nim płocha,
Ledwie zoczył jużci kocha.
Lecz uważa, prócz urody,
— W tém już baczny lubo młody —
Że ptaszyna ma w udziale
W swém mieszkaniu ziarna wiele.
Tém mieszkaniem domek mały:
Drobne kratki go składały,
I szczeblikiem drzwi podparte
Stały otwarte.
Uważał czyżyk dość długo, a potem
Lekkim zbliżył się lotem.
Nuci, śpiewa, bawi,
O miłości prawi,
Wzajemności żąda,
A na proso wciąż pogląda;
Zięba zaś swoim zwyczajem,
Wdzięczy się nawzajem.
Zięba nadobnej była urody,
A czyżyk młody.
Pokarm był piękny, liczny, dorodny,
A czyżyk głodny.
Nie myśląc więc wiele,
Posunął się śmieie,
Lecz ledwie przy kratce...
Trzask! — Czyżyk w klatce.
Zrazu pieścizoty zięby, jój głos miły,
Myśli niewoli z główki oddaliły,
Lecz niedługa
Ta usługa.

Fringelo kaj fringo

Sur arbusto de siringo
Fringelo sidis ĉe fringo.
En li pens' frivola flamas,
Apenaŭ ekvidis – amas.
Sed atentas li krom belo,
— Kvankam juna — duan celon —
Ke birdeto en bieno
Posedas multe da greno.
Loĝis ŝi en domet' pita
El kradetoj; pord' invitas
Apogita per ŝtud' lerte
Staris aperte.
Hezitis fringel' longe kaj finfine
Alflugis al domet' ina;
Dancas, kantas, ludas,
Pri amo aludas.
Senta idilio
Kaj li rigardas milion.
Ankaŭ fringo reciproke
Koketas provoke.
Belo de fringo estis ĉarma, suna,
Fringelo juna.
Mangâjo estis multa, delikata,
Fringel' malsata.
Ne pensis li saĝe,
Enflugis kuraĝe
Enon. Sed domaĝo!
Krak! Fringel' en kaĝo!
Komence fringaj kanto kaj kareso
Forigis pensojn pri kaĝa opreso,
Sed sen vervo
Posta servo,

Jakby nie ta co z początku,
Dumała gdzieś w swoim kątku,
A gdy czyżyk, grzecznie, ładnie
O śpiewanie ją zagadnie;
Huknie,
Fuknie:
— Ja póty wabię, pókim sama w domu,
Póki mi trzeba podobać się komu. —
Choć westchnął czyżyk nad dzielnością mowy
Nie stracił głowy,
Wspomniał o prosie;
Wziął się do niego. Lecz o smutny losie!
O nadziejo marna!
Dużo tam łupek, a niewiele ziarna —
Westchnął jeszcze i wzdychał, ale nic nie zmienił
Nie jeden jest czyżykiem co się dziś ożenił.

Alia ol ĉi komenca
Favora kaj pacienca.
Fringelo petis ĝentile
Pri kareso kaj pri trilo;
Ŝi severas
Kaj koleras:
— Mi nur allogas, kiam restas sola,
Nur se al iu ekplaĉi mi volas. —
Kvankam fringelo ĝemis pro ĉi frapo
Ne perdis kapon,
Memoris grenon,
Komencis manĝi. Sed nova ĉagreno!
Ho, sorto kruela!
Grajno malmulta kaj multe da ŝelo —
Fringel' perdis esperon, sed nenion ŝanĝis.
Ne unu ul' edzecon fringele aranĝis.

El komedio „Sinjoro Jowialski”

La komikama grafo

Aleksander Fredro, filo de Jacek Fredro kaj Marianna grafino Dembińska naskiĝis en Surochów sub Przemyśl, dudekan de junio de la jaro 1793-a, sed verŝajne – naskiĝatesto perdiĝis – li estis du jarojn pli aĝa. Patro de la verkisto aktiva kaj klopodema faris signifantan fortunon kun bienoj super San en nunaj Bieszczady kaj bienoj proksime de Lvovo, al kiuj apartenis vilaĝa biendomo de familio Fredro – Beńkowa Wisznia. Jacek Fredro fariĝis vicmarŝalo krona kaj en 1822 j. gajnis grafan titolon en Vieno.

Gefratoj de Aleksander estis multaj – tri fratinoj kaj kvin fratoj, el kiuj la plej elstara okazis Maksymilian – soldato servanta sub princo Józef Poniatowski, posta generalo kaj adjutanto de caro Aleksandro la Unua, kaj ankaŭ kuratoro de Varsovia Universitato kaj dramverkisto. Ĝuste li plifaciligis al frato Aleksander unuajn paŝojn sur varsovia scenejo.

Aleksander lernis nur hejme kaj rapide komencis vivon de soldato. Ricevante laŭvicajn avancojn en 1812 j. li fariĝis majoro en kvina regimento de pafistoj ĉevalaj kaj en tiu grado partoprenis moskvan kampanjon. Li sukcesis trairi al napoleona armeo kaj ĝis 1814 j. batalis kiel serva oficiro en stabo de imperiestro Napoleono.

Al familiaj bienoj li revenis post akceptita demisio kaj kurta restado en Parizo – printempe de la jaro 1814. La mastrumema patro lokigis lin en malgranda vilaĝo Jatwięgi, por ke li lernu bezonojn efike direkti al bienaj laboroj.

En la jaro 1819 Aleksander ekkonis sian venontan edzinon Zofia el grafa familio Jabłonowski, devige edziniĝintan al grafo Stanisław Skarbek. Klopodoj pri divorco daŭris longe kaj ĵus en la jaro 1828 Fredro povis edziĝi kun la elektitino. Ĉi tiu tre feliĉa paro havis filon Jan Aleksander kaj filinon Zofia.

La vivo de komedi-verkisto estis ligita kun aŭstria teraneksaĵo. Li aktive partoprenis en politikaj kaj mastrumaj ŝanĝoj de la lando, laboris super civitanaj, sociaj kaj sciencaj problemoj ofte spertante malfacilaĵojn kaj malagrabraĵojn pro malmodela mondkoncepto.

La verkiston ĉirkaŭis ĉiam ĝenerala estimo. La socio alte taksis liajn multajn distingojn, polan Krucon Virtuti Militari kaj francan Honoran Legion. Antaŭ jaro 1830 oni elektis lin ano en Varsovia Societo de Scienc-amikoj, en 1839 j. li ricevis honoran diplomon de civitano de urbo Lvovo kaj en j.1873 fariĝis unu el la unuaj anoj de Akademio de Sciencoj en Krakovo.

La finaj jaroj de la vivo Aleksander Fredro trapasis en Lvovo, en ŝatata loĝejo sur Chorążczyzna, inter familianoj. Li mortis dekkvinan de julio en la jaro 1876, oni entombigis lin en paroka preĝejo en Rudki en familiaj tomboj, kie ĝis nun troviĝas lia ĉerko. Li ordonis entombigi sin en kontuŝo.

La plej malnova unuakta komedio de Fredro **Intrigo rapide** (1815) post unu spektaklo forlasis Lvovan scenejon. Pli grandan agnoskon gajnis **Sinjoro Geldhab** (1818). De tiu momento kreskis talento de la aŭtoro kaj plaĉo de publiko.

La verkadon Fredro komencis ekster literatura medio, nur en aro de amikoj, kiuj legis kaj apogis fruktojn de lia agado. Disvolviĝo de la artisto-aŭtodidakto efektiviĝis fore de literaturaj tendencoj.

Li verkis neegalmezure, saltmaniere, kun pli longaj aŭ pli mallongaj paŭzoj. En lia verko oni povas observi du variajn teatrajn tradiciojn. Tradicio devenanta de pola komedio klerisma apogiĝas je fiksado en centro de komedio ĉefan heroon, kies malavantaĝoj kaj ridindaĵoj servas al realisme komprenataj ligoj kun epoko kaj ties problemoj. En pli konataj verkaĵoj tia kompozicio malaperas; bazo de komedio fariĝas teatra sperto de la spektanto kaj magio de superba aktora ludo.

Altajn valorojn rekonajn kaj artajn reprezentas **Sinjoro Geldhab**. La plej grava afero de ĉi tiu komedio estas provo enpremiĝi en vicajn de la blazona nobelaro estante urbano de germana deveno. Alvenintoj, kiuj restis en Pollando post napolena kampanjo kaj servantaj en administrado de la invadinto oficistoj provis gajni eble plej altan pozicion en sia nova lando. Sur afiŝo de varsovia prapremiero ni legas: **Sinjoro Geldhab** aŭ sinjoriĝinta alveninto. Konkorde kun tiu anonco sinjoro Ĉasanto de Oro aŭ Orĉasanto, kiu gajnis grandan havaĵon verŝajne per nehonestaĵoj, aspiras ankoraŭ esti nobelulo. Intrigo estis gvidita tiamaniere por pruvi, ke eĉ riĉa alveninto ne indas esti pola nobelo. Lia "parolanta" nomo kaj arigo ĉirkaŭ ĉi ĉefa heroo ĉiuj aferojn de la spektaklo devenas de tradicio klarisma.

La plej kuraĝa more, la plej eminente montranta homajn karakterojn kaj superbe verkita estas komedio **Edzo kaj edzino** (1822). Rolas en ĝi apenaŭ kvar personojn Waclaw, lia edzino Elwira, amiko de la familio Alfred kaj ĉambristino Justysia. Prof. S. Pigoń verkas: "Ĉi komedio, unu el la plej altaj, sed ankaŭ plej unuaj kaj plej aŭdacaj akiroj literaturaj de la juna aŭtoro, frapanta reflektoro ĵetita al putriĝo de grandurba kunvivo geedza. Edzo kokras la edzinon kun alloga ŝia ĉambristino, la edzino kokras edzon kun lia elkora amiko, kiu laŭvice kokras la amantinon ankaŭ kun ĉi ĉambristineto. Kontradanco de lascivo."

En intenco de aŭtoro kaj en unuaj teatraj realigoj kulpas nur Justysia; sinjoroj intencas fordoni ŝin al klostro. La fino do estas cinika kaj akuzanta medion, kiu ebligas similajn tri- kaj kvaragulojn. En postmorta eldono de Fredro-verkoj (1880) probable sub influo de la filo komedio finiĝas pli noble. La edzo pardonas al la edzino kaj al deloganto. Ĉiuj promesas plibonigon de moroj en interrilatoj – alia afero, ĉu ili scipovos tion realigi.

Ekzistas grupo de verkoj de Aleksander Fredro, kiuj apogiĝas je popola maniero krei teatraĵojn. Delonge aplikataj skemoj: ŝanĝo de roloj, travestadoj, sufiĉe primitivaj miskomprenoj, rapidaj ŝanĝoj de neprobabla intrigo, aŭtomate traktataj personoj estis revigitaj de aŭtoro kaj ornamitaj per lia neripetbla humoro. Al tiamaniere konstruitaj verkoj apartenas i.a. **Damoj kaj husaroj** (1825), **Tranokto en Apeninoj, Diliĝenso, Ho, kio okazas** (1832).

Komedion **Damoj kaj husaroj** la aŭtoro fiksas en paŭzo inter napoleonaj kampanjoj; taĉmento ripozas, bienon de Majoro vizitas tri liaj fratinoj, kiuj revas pri edzecoj, aŭ almenaŭ pri planoj ĝin organizi.

Multaj malfacilaĵoj kaj sortŝanĝoj, malfruiĝintaj erotikaj streboj de Majoro kaj diversaj stiloj paroli de diferencigitaj personoj pli facile estis atingeblaj proze, do Fredro tiamaniere realigis ĉi komedion.

Ni rare memoras, ke Aleksander Fredro tamen estis reprezentanto de esenca literatura tendenco – romantiko. Li memkompreneble ne religis ĉiujn ĝiajn postulojn, popola fantazio kaj ligita kun ĝi metafiziko estis al li entute fremdaj.

Proksima al romantiko estas unuakta komedio **Homevituloj kaj poeto** (1826). Melankolia akcepto de soleca kaj memisma mondkoncepto realigata de poeto – romantikulo ne estis kontinuata en postaj verkoj de la aŭtoro. Kontraŭe en sfero mora – afero de emancipacio de amaj sentoj, rajto elekti edzon aŭ edzinon ne por negoco, sed laŭ diktato de la koro okazis ĉe la komediverkisto pli daŭra. La ĉefa pruvo de tio estos **Fraŭlinaj ĵuroj aŭ magnetismo de la koro** (1833).

Ĉi tiu verko estas fiksita en en nobela bieno, ie sub Lublino. Poezian idealigon de amo ne konfuzas havaĵajn aferoj. Dotoj aŭ heredaĵoj ne konstruas barojn inter gejunuloj. Dank' al tio la aŭtoro povis direkti nian atenton al aspekto psikologia. Bildo de vekiĝanta ama sento estis montrita laŭ du moraj stiloj. Romantikan – sentimentalnan stilon de sentoj, kiun reprezentas Albin Fredro ridindigas kontraŭstarante al ĝi vere viran, aman stilon de Gustaw. Albin jam du jarojn ĝemas al Klara kaj nenion atingis, kontraŭe Gustaw – malgraŭ eraroj kaj sentaktaĵoj fulmrapide gajnas reciprokecon de Aniela. Fraŭlinaj ĵuroj ligiĝas kun romantika strebo liberigi amon de profitaj katenoj, kiuj devigas edziĝi kaj antaŭ ĉio edziniĝi por mono, havaĵo kaj socia pozicio. Decidon de ambaŭ fraŭlinoj ne edziniĝi oni povas trakti kiel proteston kontraŭ menciitaj moroj. Du kontraste starigitaj knabinoj ĵus komune agas, ludas, kortuŝas kaj allogas per la erotika ĉarmo.

Tute alian artan vizion prezentas **Venĝo** (1834). Ĝi ligiĝas kun romantika historismo, sed sen ideologiaj ĝeneraligoj. Oni povas trakti ĝin kiel realisman kaj elkoran adiaŭon de pasanta, nobela mondo.

Du najbaroj – kelestro Raptusiewicz kaj notario Milczek loĝas en la sama kastelo kaj kverelas pro ĉio. Eminentaj talentoj de Fredro scipovanta observi homajn karakterojn ne haltigas ĉe tiel nomataj "parolantaj" nomoj, sed riĉigas personecojn de herooj je aliaj ecoj kreante de ili homojn ridindajn, plenajn de diversaj malvirtoj, sed parte eĉ simpatiajn. Ili agas konkorde kun normoj de medio, kio limigas eblecon de mempritakso.

Gravan rolon en komedio plenumas Papkin. En ĉiuj gravaj momentoj de intrigo ne povas lin manki. Li servas al Kelestro kiel sendito kaj peranto ĉe planita edzeco kun Podstolina, li estras super atako al masonistoj riparantaj muron, alkondukas sub tegmenton de Kelestro amaton de Klara Waclaw kiel kaptiton, alportas al Notario provokon duelan de Kelestro. Papkin, nobela mensogulo, fanfarono, memlaŭdulo pri ĉiuj elpensitaj avantaĝoj estas parenco de multaj literaturaj personoj, kiujn inaŭguris roma *miles gloriosus* – militisto memlaŭdulo. Majstra starigo de tiuj tri ĉefaj herooj igas situacion, ke pale skizita paro de geamantoj estas bezonata nur por konvinke fini la intrigon de venĝo.

Lerte aplikata oksilaba verso helpas konservi vigecon kaj rapidon de dialogoj.

Dum kvin pintaj jaroj de la verkado Fredro kreis ankoraŭ du komediojn, kiujn ni povas nomi "komedioj galiciaj", lokalizitaj en la aŭstria aneksaĵo.

Sinjoro Jowialski estas verko nefacila por interpreti pro multaj kaj variaj elementoj de enhavo. La edzecaj streboj Fredro fiksas en trigeneracia familia rondo. Tuta familio forte koncentriĝas je propra vanteco, ambicio, memkontento, stulteco, socia pozicio. Ĉi tri generacioj estis bezonataj al la aŭtoro por plene karakterizi galician medion de bienposedantoj. La plej juna parto de tiuj personoj montriĝas la plej malbone, kiel materializitaj egoismaj cinikuloj.

Mizantropo de Fredro en **Sinjoro Jowialski** montriĝas precipe, pli forte ol en aliaj verkoj. La aŭtoro kritikis ĉiujn aĵojn de nobela vivo post malvenko: mankon de patriotismo, emon kunlabori kun invadanto, ŝajnan noblecon de romantisma vidpunkto. Personoj en ĉi verko anoncas groteskon plene realigitan de Witold Gombrowicz. Dum multaj jaroj la ĉefa heroo de komedio estis traktata kiel infaniĝinta sarmata olduleto.

Stanisław Pigoń montris lin kiel homon, kiu defendas sin kontraŭ laŭvicaj naciaj malvenkoj per moko kaj rido. Li mokas ĉiujn kaj ĉion, ĉar la vivo lernis lin, ke nur moko kaj rido scipovas certigi al li sekurecon. Jowialski ne estas eksmoda defendanto de tempo, kiu pasis. Li estas ulo liberala en aferoj de sento kaj edzeco, kiu bonege orientiĝas en sia medio kaj helpe de proverboj, fabloj kaj rakontetoj montras ĝian malgrandon kaj ordinarecon en intencoj kaj faroj.

Fredro aperas ĉi tie ankaŭ kiel grandioza fabloverkisto kaj konanto de proverboj.

Ĝismortaĵo (1835) – historio de uzuristo ĉasanta al havaĵo de juna diboĉulo, malgraŭ multaj farsaj riprenoj postrestas impreson tragedian – bildigas problemon fali de ĝisnuna alta tavolo de la socio.

Post jaroj de muto interrompita en jaro 1853 Fredro fariĝis ankoraŭ aŭtoro de kelkaj komedioj, el kiuj plej alte taksataj estas **Edukito**, **Edziĝi mi ne povas**, **Kandelo estingiĝis**, **Revolvero** kaj **Granda homo por malgrandaj negocoj**.

Krom komedioj en la lasta tempoperiodo de verkado ekestis eminenta pro strukturo kaj humoro memrlibro **Trifoje po tri** (1880) montranta tra-vivaĵojn de la aŭtoro de infaneco ĝis reveno vilaĝon post milita servo. Ĉi verko estis eldonita ĵus postmorte, simile kiel aro de morozaj aforismoj pri diversaj akcidentoj de la homa vivo **Skribaĵoj de oldulo**.

Se temas pri rilato de Fredro al literaturaj direktoj kaj opinio, ke li kvankam verkis en romantika epoko – romantikulo ne estis, oni tamen devas substreki lian ligan kun realismaj tendencoj de romantiko. Influis tion liaj verkaj talentoj, antaŭ ĉio povi precize observi vivon, ega impresiĝemo rilate al aĵoj komikaj kaj al lingvo. Liaj komedioj prezentas riĉan galerion de bildoj kaj bildetoj el la bienula vivo kun abundo de moraj detaloj kaj abundo de individuaj personoj traktataj ku favora humoro aŭ ironie kaj satire. Lia arta lingvo enhavas brilajn konceptaĵojn, ŝercojn, proverbojn kaj aforismojn. Decidemaj knabinoj el liaj komedioj, junaj diboĉuloj, maljunaj servistoj kaj stranguliĝintaj olduletoj ridigas kaj ĝuas nin ĝis nun, des pli ke klaraj kaj bonege konstruitaj psike fredraj herooj estis kaj estas volonte ludataj de la plej elstaraj aktoroj.